



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

5-a de majo

Ĉiropa
Tago !
=====

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 18/77 - 2 majo 1977
Aperas ĉiusemajne

Saluton, Amikoj

Ĉi tio ne estas kutima artikolo; unufoje oni skribas en esperanta lingvo en ĉi tiu gazeto. Jam ni vidas vin malfermi viajn okulojn kaj demandi, ĉu ĝi estas finlanda, pollanda aŭ rusa lingvo... "Eraro estas homa".

Sed jam estas tre bone ke kelkaj gelernantoj povos legi ĉi tiun artikolon. Jen la rezulto de la pacienco de S-ro Drabs, kiun ni salutas. Ni scias ke ni skribas kun multaj malkorektaĵoj, sed tio ne gravas. Ni pensas ke vi ne vidas ilin, ĉar vi estas, kiel ni, ankoraŭ malbonaj Esperantistoj. Ni ne volis ke S-ro Drabs korektu ilin, ĉar ni dezirus ke tio estu neatenditaĵo! Tamen li kaj Pastro Kindler vidas ilin.... Pardonu, ni petas!

Tiu artikolo estas stultega, ni scias, sed ni ne havas grandan inspiron.... Estas nur por danki S-ro Drabs pro ĉio kion li faris, faras kaj faros por ni. Se vi pensas ke ni manĝas dolĉaĵojn (li ne toleras tion, plejmulte se oni amacas!), ke ni oscedas (ĉu vi memoras, oni lernis tiun vorton lastan semajnon?), ke ni babilas (multe!) dum li parolas, vi vidas ke li estas tre instruema (ni ne scias ĉu tiu vorto ekzistas, sed ĝi signifas ke li tre ŝatas instrui; prefikso -em, ĉu ne?). Li donis al ni kelkajn adresojn en la tuta mondo por komuniki kun aliaj Esperantistoj. Do, ni ne scias kial ni skribis, tial ni haltas ĉi tie. Estis nur por pruvi ke estas eble skribi Esperanton en la gelernantoj-gazeto.

Ankoraŭ grandan dankon, dankegon al s-ro Drabs! Se vi volas fari kiel ni, ne hezitu! Forgesu viajn gepatrajn lingvojn por ne krokodili, kaj venu kun ni!

^
Ĝis merkredo, 3-a etaĝo
Klasĉambro de S-ro Drabs, je la
dua kaj kvarono.

Christine kaj Barbara 7^oFB

Ni ankoraŭ volas danki Godelieven ĉar ŝi tajpis tion; estus malfacile por la redakcio legi nin, plejmulte en lingvo kiun ili, laŭ ĉia kredebleco, ne komprenas!

La supra artikolo aperis en la aprila numero (1977) de la gazeto por gelernantoj "Eurald Tribune" de la Ĉiropa Lernejo en Luksemburgo. Estis la unua fojo ke en tiu multlingva gazeto aperis kontribuaĵo de gelernantoj en Esperanto. Tiu artikolo estu por ni kuraĝigilo okaze de la Ĉiropa Tago 1977, la 5-a de majo!

Trilanda Esperanto-renkontiĝo

Lieĝo (pp) - La 17-an de aprilo okazis la Trilanda Esperanto-Renkontiĝo de esperantistoj el la limregionoj de Belgio, Nederlando kaj Germanio en la Kastelo Wegimont, regiono Lieĝo. Ĉeestis ĉ. 100 personoj, inter ili preskaŭ pli ol duono gejunuloj. Menciinda afero, ĉar ofte oni aŭdas plendojn, ke en nia movado mankus junuloj. Al la Esperantogrupo Verviers kiu tre bone organizis la renkontiĝon, meritas la danko de la partoprenintoj!

Internaciaj intensaj kursoj

Cuxhaven (pp) - "Internaciaj intensaj kursoj" estis la oficiala nomo de la ĉi-jara paska renkontiĝo, al kiu Germana Esperanto-Junularo invitis al Cuxhaven-Berensch komencantojn kaj progresemulojn de la Internacia Lingvo. La nombro de la partoprenintoj ne povis kontentigi la atendojn de la organizintoj. Venis nur 26 gejunuloj, inter ili 6 eksterlandanoj kun la naciecoj turka, nederlanda, brazila kaj novzelanda.

La aranĝo komenciĝis la 9-an de aprilo kun la interkona vespero. Ĉiujfoje du homoj reciproke intervjuis sin kaj publike sciigis la rezultojn. Cetera frukto estis desegnaĵo de la intervjupartnero. La laborprogramo okazis en tri grupoj dividitaj laŭ lingvaj antaŭscioj. La grupon por la komencantoj gvidis Paŭlo Ereno, brazila instruisto loĝanta en Nederlando. Li pliriĉigis sian instrumentodon per promenoj ĉirkaŭ la ejo, dum kiuj li sukcesis ĉe la objekto klarigi la diferencojn inter fojnoforko kaj sterkamasforko. La duan grupon instruis unue Franz Kruse, poste Stefan Mac Gill, kiu prezentis dum la vesperoj kun siaj lernantoj skeĉojn. La trian grupon okupis Klaus Schubert per tradukadoj. Ĉe tio la tradukado de germanaj herolegendoj montriĝis tre amuze.

De la distra programo menciindas krom la tradiciaj kantado kaj popol-dancado la ekskurso per la ŝlimmar-ĉaro al la insulo Neuwerk kaj la danco tra la paska fajro. La vojaĝeblecojn per Esperanto elmontris Klaus Schubert en prelego pri Japanio. Stefan Mac Gill kun lumbildoj peris impresojn de sia patrolando Novzelando. Kiam la partoprenintoj la 15-an de aprilo sin adiaŭis, ili povis rigardi al agrabla semajno, kies sukceson malheligis nur la malmulta partoprenintaro kaj la tre printempa vetero.

Otto Gessner, Würzburg

21-a Kongreso de jugoslaviaj esperantistoj

Novi Sad (pp/mĝ) - La Konferenco de Vojvodina Esperantista Ligo, la plej alta memadministrata organo de la Ligo, konsistanta el 19 delegitoj, okazigis en Novi Sad la 3-an de aprilo sian unuan kunsidon, al kiu partoprenis ankaŭ la prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo, prof. d-ro B. Popović. El la laborprogramo por la jaro 1977 troviĝas inter alie vizito de historiaj lokoj de jugoslavia revolucio, aranĝo de granda Esperanto-ekspozicio, eldono de Antologio de poezio de vojvodinaj verkistoj, preparo de paralela vortaro Esperanta-kvinlingva por vojvodinaj naci(ec)oj kaj pli-firmigo de kunlaboro kun Socialista Unuiĝo kaj kulturklerigaj komunaĵoj. Oni ankaŭ diskutis pri la punkto, entrepreni necesajn paŝojn por okazigo de la 21-a Kongreso de jugoslaviaj esperantistoj en Novi Sad en 1978.

Esperanto-Tagoj en Belgio

Kortrijk (pp) - De la 28-a ĝis la 30-a de majo 1977 okazos en Kortrijk, komerca urbo en okcidenta Belgio, Esperanto-Tagoj, kiuj ampleksos la Kongreson de Belga Esperanto-Federacio, la Markolan Kongreson (Suda Britio, Norda Francio kaj Belgio) kaj la 50-jaran jubileon de la loka Esperanto-Klubo (1927 - 1977).

El la provizora programo menciindas: Interkona vespero, oficiala akcepto, ekumena diservo, laborkunsidoj, prezentado de "Teatro Esperanto" el Parizo. Interesuloj turnu sin al la korespondadreso: Esperanto-Centrum, Magdalenastr. 29, B-8500 Kortrijk, Belgio.

Anonceto

* Bielefelda esperantisto serĉas samideanon cele konversacion
* kaj korespondadon. Interesuloj skribu al: S-ro Joh. Schalk,
* Lipper Hellweg 32, D-4800 Bielefeld.
*

Esperanto en Radio

El la leterkesto de Radio Roma ni citas:

"El Milanowek, Pollando, 8-foje skribis Andrzej PETTYN, vicprezidanto de Pola Esperanto-Asocio kaj redaktoro de la Esperanto-Elsendoj de Pola Radio. Li diras, interalie:

'En Pilo-Press mi legis pri la nombro de viaj korespondaĵoj dum 1976; espereble, ĉijare venos plimulte.

Multaj opinias, ke "Internacia Radio-Revuo" estus ege bezonata; kion vi pensas pri tio?

Se hazarde vi havas 5 liberajn minutojn, klarigu al mi, kial vi petas poŝtkartojn kun presita poŝtmarko; ĉi tiun enigmon neniu el miaj amikoj solvis.

Miaj spertoj pri la aŭskultado de viaj elsendoj ŝanĝiĝas de semajno al semajno. Post preskaŭ perfekta aŭdebleco venas dimanĉoj, kiam la elsendoj estas apenaŭ kompreneblaj; sed tamen mi devas substreki, ke mi sekvas viajn programojn kun la reguleco de 2-3-foje en la monato....

Laŭ miaj ĝisnunaj spertoj, estus pli bone ŝanĝi la elsendo-tempon de viaj programoj. Ekzemple, je vendredo aŭ sabato, kaj unu horon pli malfrue (inter la 22-a kaj la 22-a kaj 30. Krome, tiu elsendo estu 30-minuta, por ke oni povu prezenti en ĝi pli da temoj ankaŭ al la sfero de itala politiko kaj ekonomio.'

Ni klopodas rapide pritrakti la diversajn temojn tuŝitajn de nia 'kolego':

La nombro de la ĉijaraj korespondaĵoj estas kontentiga, ĝi eĉ superis tiun de la sama periodo pasintjara.

Ni samopinias, ke "Internacia Radio-Revuo" estus tre oportuna, kaj ni estas pretaj kunlabori je ĝi, se troviĝos kuraĝa eldonisto (kiel Ludwig PICKEL el Nürnberg, kiu jam iniciatis almenaŭ la aperigon de "Radio-bulteno") kaj se sufiĉe da personoj montrus intereson.

Ni petas, ke oni prefere skribu al ni sur aerogramoj aŭ sur poŝtkartoj kun enpresita poŝtmarko, evitante filatelajn afrankojn, ĉar: oni evitas "tentojn" de forŝtelo de la korespondaĵo; la poŝto estas liverata pli rapide, ĉar oni ne devas atendi, ke en la diversaj oficejoj oni "senvestigu" ĝin el la poŝtmarkoj; sur unu sola paperpeco oni havas tekston, adreson de la sendinto kaj poŝtostampon (kiu pruvas, ke la korespondaĵo efektive vojaĝis); oni havas samformatajn paperojn, pli facile konserveblajn; pro la limigita spaco, oni nepre devas koncizigi la skribaĵojn; oni elspezas malpli multe, kaj do oni povas skribi pli da fojoj per la sama kosto."

Ĉu Budapeŝto denove enkondukos Esperantajn elsendojn?

Budapeŝto (pp) - Okaze de vizita restado en Budapeŝto d-ro J. Kondor, Neuwied, vizitis la Studion de Radio Budapest la 14.4.77. Li havis interparolon kun la sekciestro de Hungara Radio pri la programoj por hungaroj en eksterlando, s-ro Gáti. Pri tiu vizito kaj interparolo d-ro Kondor skribas:

"S-ro Gáti salutis nin kore kaj volonte aŭskultis miajn spertojn rilate la diversajn Esperanto-elsendojn kaj sincere miris, kiam li reaŭskultis mian sonbendon kun la programo de Pola Radio pri mia porleprula agado kaj poste tiun de Radio Vatikana, en kiu Radio Vatikana laŭdis mian aktivadon favore al Radio Vatikana... Ĉion mi prezentis al li per mia Telkaradio, kiun mi kunportis al Hungarujo kaj ĉie montris al homoj kiu ĝi estas la modernan teknikon. Nature mi samtempe bonege varbis por Esperanto! Post la prezento de la bonege sukcesinta surbendigo mi nature instigis s-ron Gáti simile agi, kiel Pola Radio kaj Radio Vatikana kaj la afabla respondo estis: Ho, jes, mi volonte reakceptus Esperanton ĉe la Hungara Radio, sed... eĉ la unua provo fiaskis pro manko de sufiĉe da juna voĉo... Laŭ li maljunaj voĉoj ne taŭgas por elsendo.. Post plua diskuto s-ro Gáti promesis kontaktiĝi kun Hungara Esperanto-Asocio kaj peti de ĝi konvenajn "fortojn" por eventuala enkonduko de Esperanto."

Esperanto en Radio (Daŭrigo)

Ni povus ĉiusemajne plenigi la 4 paĝojn de ĉi tiu bulteno raportante pri la Esperanto-elsendoj kaj komentante ilin. Sed Pilo-Press ja estas ĝenerala informilo kaj ne povas sin limigi al la problemoj de Esperanto-elsendoj. Sed eble ni povos iom post iom realigi la planon eldoni regulan radio-bultenon, se estas intereso flanke de la legantoj kaj aŭskultantoj. En lasttempaj konversacioj kelkaj legantoj esprimis sian kontenton pri la unua numero de tia radio-bulteno kun politikaj tekstoj, kiujn ili kun sciavolo kaj intereso legis. Sed ŝajnas, ke momente bazo por aparta radio-revuo ne ekzistas. La problemon de "Esperanto en Radio" oni devas solvi per la jam ekzistantaj Esperanto-revuoj, kiuj regule publikigu apartajn rubrikojn "Esperanto en Radio". Sed tamen por realigi tion, necesas, ke la kunlaboranto por tiu rubriko laŭeble regule aŭskultu la Esperanto-elsendojn, ĉar oni ne povas skribi pri io, kion oni ne konas. Tio signifas, ke entute "Esperanto en Radio" devas ludi pli gravan kaj esencan rolon en la konscio de la Esperanto-socio.

Rimarkoj pri lasttempaj elsendoj

ORF Wien. "Pri la homaj rajtoj oni parolas nun pli kaj pli ofte" konstatas Dr. Alfred Macher en sia semajna komentario de la 30.4./1.5.77, kaj li aludis la baldaŭ okazontan konferencon en Beogrado. En la sama elsendo oni povis aŭdi la unuan felietonon de D-ro Karl Beckmann pri "Islando kaj Aŭstrio". La serion oni daŭrigos en la venontaj elsendoj.

ORF Regional. Tiu 5-minuta ĵaŭda elsendo alportis manplenan da germanlingvaj informoj aktualaj kaj E-lingvan raporton pri la Zamenhof-aranĝo en la pola kulturinstituto, la 16-an de aprilo, kiun ĉeestis ankaŭ la ĉefredaktoro de la Viena gazeto "Kurier", la aŭtoro de la interesa artikolo "La Mondo de D-ro Esperanto" en tiu gazeto.

Svisa Kurtonda Servo. Dum la tri pasintaj elsendoj s-ro Gacond prezentis intervjuojn kun Marinko Ĝivoje, Zagrebo, pri liaj impresoj en Svislando kaj speciale en La Chaux-de-Fonds kaj la tiea Esperanto-agado. M. Ĝivoje restadis pro vortaristaj esploralaboroj de la 20-a ĝis la 26-a de marto en La-Chaux-de-Fonds. D-ro A. Baur daŭrigis sian prelegserion pri la eklezia strukturo de Svislando.

Zagrebo. La lasta elsendo de ĉiu monato estas dediĉita al la respondoj de aŭskultantoj kaj preparado de ricevitaj periodaĵoj. Oni citis multajn tiajn periodaĵojn, ĉefe bultenojn kaj informilojn.

Varsovio. "La supereco de la socialisma demokratio" estis la titolo de unu el la pasinttagaj komentarioj. Ju pli multe proksimiĝas la dato de la konferenco en Beogrado, des pli ofte oni aŭdas tiajn komentariojn kaj elpaŝojn de polaj gvidantoj. Kaj el tiuj eldiroj oni devas konkludi, ke fakte oni difinas la "homajn rajtojn" en Pollando laŭ aliaj kriterioj ol en okcidentaj landoj. Eĉ la vorto "demokratio" havas en la du ideologiaj blokoj malsamajn enhavojn. - Regule oni povas aŭdi la rubrikojn: "El la vivo de PEA", "Trarigardo de la Esperanto-gazetaro" kaj "Esperanto-Ekspreson". - La dimanĉa Esperanto-anguleto kadre de la germanlingva programo plej bone estas aŭdebla matene, kelkajn minutojn antaŭ la 7-a horo, sur ondo 49 metroj. En la pasintdimanĉa anguleto Jerzy Grum citis el la artikolo "Ĉu Universala Kongreso inter eskimoj?" de H. Röllinger en Europa Esperanto-Revuo 7-8/77.

Pekino ĉiam estas bone aŭdebla ĉi tie en Nürnberg, same IBRA-radio kaj Radio Vatikana. Ankaŭ la aŭdebleco de ROMO iom post iom pliboniĝas. Pro la samtempa elsendado de Romo kaj Radio Vatikana mi proponas, surbendigi la elsendon de Vatikana Radio kaj samtempe aŭskulti Romon. S-ro Höpfler el Lippstadt faras inverse!

La poezia mondo de W. Auld

Bruselo (pp/HdE) - La 7-an de aprilo s-ro W. Auld prelegis en Bruselo pri "La poezia mondo de W. Auld" en ĉeesto de ĉ. 50 personoj el Bruselo, Bruĝo, Antverpeno k.a.